


La Krokodil'



Informbulteno de Esperanto-Kultur-Centro de Tuluzo

N° 42 – januaro 2007

ENHAVO

Enhavo.....	1
Kalendaro.....	1
Okazos (Ne ratez pas.....)	2
Esperanta staĝo temanta pri la ĉirkaŭumo	2
Okazis.....	2
Studa semajnfino en Arrout.....	2
Prelego pri Nepalo.....	2
Budo en la domo de la regiona registaro. .	3
Mencioj pri esperantaj kursoj aperis en bulteno de la Maison de l'Europe.....	3
Deux nouveaux cours viennent de commencer.....	3
Vidpunkto.....	3
Kiel praktiki la lingvon?.....	3
En la reto.....	4
Uzo de esperanto en retejoj de eŭropaj institucioj.....	4
Toulanges.....	5
Nouveau redacteur.....	5

**Bonan kaj
verdan novan
jaron!**

KALENDARO

JANUARO

- 12 **Manĝo-klaĉo**
20 h. Maison Quartier Ranguel, 19 rue Claude Forbin, 31400 Toulouse
Chacun apporte un plat à partager. Ne pas oublier son couvert.
- 13 **Galette des rois**
15 h. À l'invitation des Cheminots Toulousains pour l'espéranto.
Centre de Loisirs SNCF "Surcouf", 12 Ave de l'Hers, 31500 Toulouse, (Métro Jolimont, puis bus)
Une modeste participation sera demandée.
Inscription: téléphoner à Josée au : 05 61 17 93 16 avant le 10 janvier.
- 16 Début d'un Cours Express d'espéranto
Horaire : 19 h - 21 h pendant 6 mardis
Lieu : 1 rue Joutx Aigues, 31000 Toulouse (métro Esquirol)
Public : tout public curieux de faire connaissance avec cette langue.
Organisateur : Centre Culturel espéranto, T 05 61 25 55 77- esperanto.toulouse@free.fr
- 25 Débat en espéranto au «Bâton à palabre »
20 h. Café le Bâton à palabre, 15 rue de Thionville , 31000 Toulouse

FEBRUARO

- 2 Manĝo-klaĉo
Horaire: 20 h. Lieu à déterminer
- 5 **Début d'un Cours Express d'espéranto**
Horaire : Les lundis, 19.30 h - 21.30 h.
Lieu : MJC Ancely, 7 Allée des Causses, 31300 Toulouse
Déroulement : 6 séances de deux heures.
Public : tout public curieux de faire connaissance avec cette langue.
Organisateur : MJC Ancely, 7 allée des Causses, 31300 Toulouse T: 05 61 49 05 74
- 8 Débat en espéranto au «Bâton à palabre »
20 h. Café le Bâton à palabre, 15 rue de Thionville , 31000 Toulouse.

Esperanto-Kultur-Centro

1 place des Avions, 31400 Toulouse

tel/fax 05 61 25 55 77

esperanto.toulouse@free.fr <http://esperanto.toulouse.free.fr/>

OKAZOS (NE RATEZ PAS...)

**Esperanta staĝo temanta pri la
ĉirkaŭumo**

La *Cercle biterrois d'espéranto* okazigas esperantan staĝon pri la ĉirkaŭumo ĉe la mediteranea marbordo de Francio (Agde). Ĝi okazos de la 16-a ĝis la 23-a de majo.

En tiu staĝo oni povos malkovri la internacian lingvon kaj ankaŭ la regionan naturan kaj humanan ĉirkaŭaĵon.

Pli da informo pri tiu staĝo troveblas en la ttt-ejo: <http://environnement.34500.free.fr/10esperanto.html>

OKAZIS

Studa semajnfino en Arrout

La 11-an kaj 12-an de novembro okazis studa semajnfino en Arrout, Ariège. Tri kursoj estis aranĝitaj, por eklernantoj, por plibonigantoj kaj ankaŭ pedagogia. Unu el la partoprenantoj rakontas sian sperton:

La semajnfino en Arrout estis mia unua partopreno en longa esperanta aranĝo, do, kompreneble, ĝi iĝis speciala kaj interesa sperto.

Mi ĉeestis la pedagogian kurson gvidatan de Renée Triolle. En ĝi, mi multe lernis pri esperanto, ĉar Renée bonege konas kaj la lingvon, kaj la movadon, kaj ankaŭ la problemojn rilatajn al la lernado.

Kune kun mi ĉeestis la kurson ankaŭ ok aliaj studantoj. Tio estis bona ĉar tiu nombro estas tre adekvata por kurso, sufiĉe granda por havi plurajn vidmanierojn kaj demandojn, kaj sufiĉe malgranda por havi varman kaj agrablan etoson.

Plie, dum la semajnfino mi povis konversacii kun Renée, kaj ankaŭ kun la aliaj instruistoj kaj lernantoj, de ĉiuj niveloj; tiaj konversacioj estis tre interesaj kaj bonege kompletigis mian lernadon.

Ankaŭ mi multe ŝatis la etoson. Kune, ni multe babilis, promenis, kaj manĝis. Tiu semajnfino estis la unua fojo en kiu mi uzis la lingvon dum pli ol kelkaj horoj. Tio multe interesis min, ĉar finfine mi povis sperti la lingvon en ordinara vivo. La plej grava konsekvenco por mi estis ke mi iĝis konvinkita ke Esperanto estas vera lingvo, kiu taŭgas por ĉiu situacio, bonege, ĉu ne?

Sendube, mi reiros al aliaj esperantaj aranĝoj.

Pere Quintana

Prelego pri Nepalo

Je la 12-a de decembro, EKC okazigis prelegon pri Nepalo fare de Profesoro Mukunda Raj Pathik el la Katmandua Universitato, Nepalo.

La prelegon ĉeestis proksimume dudek homoj, plejmulte virinoj, kaj proksimume, duono ne parolis esperanton. Do, estis bona okazo por konigi la lingvon.

Mukunda, prelegis pri sia lando. Li montris bildojn kaj videojn pri la geografio, la urboj, la muziko, k.t.p. Sed kio plej interesis la ĉeestantaron estis la politika situacio en la lando, kaj ankaŭ la loko de virinoj en ĝia socio. Do, oni multe lernis pri la freŝaj politikaj ŝanĝoj: la milito, la morto de kelkaj membroj de la reĝa familio kaj ankaŭ pri la nova reĝo. Profesoro Mukunda ankaŭ parolis pri la esperantistoj, kiuj antaŭ kelka tempo estis kaptitaj en la lando, kaj kion li faris por liberigi la kaptintojn.

Finfine, oni ankaŭ aŭdis pri la esperanta movado

en Nepalo. La preleganto parolis pri kiel esperanto estis alportita al tiu azia lando kaj ankaŭ kiel la movado tie evoluis poste.

La vespero estis tre agrabla kaj la preleganto ne maltrafis okazajn por onin ridigi.

Budo en la domo de la regiona registaro

Je la 17-a de novembro la *Réseau universitaire Toulouse Midi-Pyrénées* okazigis internacian studentan vesperon ĉe la domo de la regiona registaro en Tuluzo. Tuluzaj asocioj estis invititaj al la vespero kaj EKC, dank'al la laboro de Samia kaj kelkaj aliaj anoj de nia asocio, estigis budon per kiu ni informadis al la eksterlandaj studentoj de Tuluzo.

La etoso de la vespero estis agrabla, junuloj el la tuta mondo renkontiĝis kaj paroladis manĝante, drinkante kaj aŭskultante koncerton. Estis ankaŭ multe da asociaj budoj, konsekvence, kapti la atenton de la ĉeestantaro ne facilis. Sed, multe da homoj venis paroladi kun ni kaj interesiĝis pri la internacia lingvo. Multe el ili jam antaŭe aŭdis ion pri la lingvo sed ne sciis ke ja estas kaj junaj kaj maljunaj parolantoj kiuj sukcese uzas la lingvon ĉiutage kaj nacie kaj internacie.

Multaj interesiĝantoj studis delonge la anglan kaj havis problemojn por ĝin bone mastrumi. Ili, kiuj estis studentoj en fremda lando, bone komprenis la lingvan problemon kaj komprenis la rolon de esperanto en internacia komunikado. Tiel, kelkaj el ili, demandis pri la kursoj kaj eĉ aliĝis.

Ĝenerale, la interesiĝantoj miris kiam aŭdis pri la nombro de ĉeestantoj en kaj UK kaj IJK, kaj ankaŭ Pasporta Servo estis sukcesa por kapti la atenton de la interesiĝantoj.

Tiel, la vespero estis amuza, agrabla kaj ankaŭ bona por la disvastigado de la internacia lingvo, Esperanto.

Mencioj pri esperantaj kursoj aperis en bulteno de la Maison de l'Europe.

La Maison de l'Europe de Tuluzo, en sia oktobra reta bulteno, menciis la kursojn okazigotajn de EKC. La bulteno ankaŭ menciis kursojn de aliaj lingvoj, internaciaj kulturaj aferoj kaj ankaŭ pri aferoj rilataj al la Eŭropa Unio.

Deux nouveaux cours viennent de commencer

Récemment, deux nouveaux cours ont ouvert:

- Un cours pour débutants, annuel, à commencé à la mi-novembre à la maison de quartier de Rangueil: lundi de 18 à 19 h (4 élèves)
- Un "cours express" à commencé le 11 décembre à la MJC d'Ancely. Il durera 6 semaines, jusque fin janvier, et aura lieu les lundis de 19.30 à 21.30 (5 élèves)

VIDPUNKTO

Kiel praktiki la lingvon?

Kiel ĉiuj vivantaj lingvoj, Esperanto devas esti praktikata. Fininte kurson oni bezonas paroli ĝin. Oni devas senti, ke la lingvo havas iun utilecon. Pro tio mi tre ŝatas precipe la manĝo-klaĉojn, kiujn EKC organizas la unuan vendredon de ĉiu monato. Ili estas foje amase partoprenataj, foje estas nur kelkaj samideanoj, sed ili ĉiam estas interesaj.

Ni kunvenas en la Maison de Quartier de Rangueil, malfacile trovebla, sed kie oni facile povas parki, male al la malnova sidejo, kiu

tamen estis multe pli agrabla. Iam unu preparis manĝon kaj oni devis pagi modestan sumon, nun ĉiu alportas manĝaĵojn aŭ trinkaĵojn, kio multe pli plaĉas al mi. Ĝenerale la renkontiĝo komenciĝas je la 20-a horo, sed oni komencas manĝi nur ĉirkaŭ la 21-a horo. Kiel kutime en tiuj okazoj, oni antaŭe satigas sin per antaŭmanĝoj kaj aperitivo. Mi pro tio preferas manĝi hejme je la kutima horo kaj poste nur gustumi deserton kaj trinkaĵon. Mia granda plezuro estas diskuti en Esperanto kaj tion oni povas fari tre bone. Ĝenerale oni tre malmulte krokodilas. Ne estas deviga temo, sed oni babilas pri ĉiuj interesaĵoj kaj pri la esperanta vivo. Ofte estas gasto. Ekzemple, antaŭ ol ŝi iris instrui en Arrout vizitis nin Renée Triolle, ĉefdelegitino de UEA. Oni ankaŭ povas pruntepreni libron el la biblioteko. Oni ankaŭ povas aĉeti kelkajn novajn librojn. Mi nur povas alvoki pli multajn esperantistojn regule partopreni en tiu amikeca etoso, ili rapide progresos en la lingvo kaj agrable pasigos vesperon.

Alia interesaĵo estas debatoj en la kafejo Bâton à Palabres. Ili okazos unufoje monate en tiu kafejo, en la kvartalo Saint-Aubin. Oni tie devas konsumi, trinkaĵon kaj manĝetaĵon sed tio estas tre malmultekosta. Sed estas fiksita temo: ekzemple ŝercoj en esperanto, aŭ filozofia temo. Oni ekscias ilin antaŭe kaj povas prepari la vortrezoron de la debato. Tamen por fiksa temo, la lingvo estas pli malfacila, sed estas tre bona ekzerco ne nur por praktiki, sed ankaŭ por konscii, ke Esperanto ankaŭ taŭgas ne nur por la ĉiutaga vivo sed ankaŭ por debati pri ideoj. Ne timu partopreni en tiuj aranĝoj, precipe tiel via lingvo-scio kreskos rapide kaj en agrabla ĉirkaŭaĵo.

Robert Pontnau

Uzo de esperanto en retejoj de eŭropaj institucioj

Okaze de eŭropa tago pri lingvoj (26-a septembro) la Eŭropa Konsilio eldonis en sia TTT-ejo informojn pri la lernado de fremdaj lingvoj skribitaj en esperanto.

Tiu TTT-ejo troveblas ĉe <http://www.coe.int/JEL> kaj tie oni trovos informojn en la angla, la franca kaj la germana kune kun la internacia lingvo Esperanto.

En tiu TTT-ejo legeblas:

Kial ni bezonas la Eŭropan Tagon de Lingvoj?

Kvankam multaj homoj samopinias pri tio ke ni ĉiuj devus paroli alian fremdan lingvon, en multaj

landoj fakte ne pli ol la duono de la loĝantoj scipovas duan lingvon.

Neniam antaŭe estis tiom da okazoj labori aŭ studi en aliaj eŭropaj landoj, sed la manko de lingvaj

konoj malhelpas multajn personojn eluzi tiujn okazojn.

Pro la ekonomia tutmondiĝo kaj la internacia strukturo de multaj entreprenoj pli kaj pli necesas

scipovi aliajn lingvojn por efike labori ankaŭ en la propra lando.

Eŭropo posedas veran lingvotrezoron: pli ol 200 eŭropajn lingvojn, sen enkalkuli tiujn kiujn parolas

personoj devenantaj de aliaj kontinentoj. Tiu grava kapitalo devas esti agnoskata, uzata, gardata.

Lerni lingvon bonegas por ĉiu, de kiu ajn aĝo; neniam estas tro malfrue por profiti de lingvolernado

kaj de la perspektivoj kiujn ĝi malfermas. Lerni la lingvojn de aliaj popoloj helpas nin pli bone

kompreni unu la aliajn kaj superi la kulturajn diferencojn.

Toulangués

Toulangués est une association, créée par Marion Quenut, (qui est en train d'apprendre la langue internationale espéranto). Cette association gère un site web qui a l'objectif d'informer sur toutes les langues qu'on peut apprendre à Toulouse. On peut y trouver tout type d'informations: information sur les langues, cours, échanges linguistiques, etc. De plus, on y trouve aussi un forum où ceux qui apprennent une langue peuvent parler et s'aider mutuellement. L'espéranto est présent sur le site, donc c'est un bon lieu où faire connaître notre langue.

<http://www.toulangués.fr>

NOUVEAU REDACTEUR

Avec l'objectif d'enlever des tâches au secrétaire de l'association, quelques uns de nous avons pris quelques tâches qui jusqu'à maintenant étaient réalisées par le secrétaire.

Pour ceux qui encorbe ne me connaissent pas, je suis né dans l'île de Minorque (Espagne) et maintenant je suis étudiant à Toulouse. Le français n'est pas ma langue maternelle, donc il est possible que quelques fautes ou phrases bizarres pourraient m'échapper, mais je vais essayer de ne pas trop abîmer cette belle langue. Heureusement, nous avons l'espéranto! Avec lequel on peut avoir une communication internationale facile et équitable.

Pour publier quelque article, photo, poème, chanson, etc sur la Krokodil', vous pouvez me contacter par courriel à l'adresse: pere@quintanasegui.com.

Finalement, je voudrais vous souhaiter une belle et verte année 2007!

Ĝis!